El la libro de

Rupert Read / Samuel Alexander

# ĈI CIVILIZACIO FIASKIS

## Interparoloj pri la klimatokrizo
## kaj la ŝanco de rekomenciĝo

Kun postparolo de
Helena Norberg-Hodge

La origina angla versio
*This civilisation is finished.*
*Conversation on the end of Empire – and what lies beyond.*
(c) 2019 Simplicity Institute, Melbourne

La germana versio:
Diese Zivilisation ist gescheitert
- Gespräche über die Klimakrise und die Chance eines Neuanfangs
Aus dem Englischen übersetzt von Marcel Simon-Gadhof

ISBN (de la germana versio) 978-3-7873-3802-3
Felix Meiner Verlag Hamburg 20

Alesperantigis el la germana kaj la angla versioj
Wolfgang Guenther
(Asocio de la Verduloj Esperantistaj – AVE)
w.guenther.esperanto@web.de
2020

## Enhavo

1 La rigardo en la abismon
2 Klimatokaoso: Ĉu "nigra" aŭ "blanka" cigano?
3 Teknologiaj tentoj
4 Geo-inĝenierado kaj la Antaŭzorgada Principo
5 Ĉu oni diskutu kun klimatokontestuloj
6 La Dio de la Verda Kreskado forlasis nin
7 Civila Malobeado kaj *Extinction Rebellion (Estingo-Ribelo)*
8 Politiko kaj spriteco
9 La solvo de la problemo pri malriĉeco:
Ĉu "Evoluigo" aŭ Post-evoluigo?
10 Teknologio post la fino de la imperio
11 La "inform-deficit"-modelo de la ŝanĝiĝo
12 La rolo de la "instruistoj" en malfortiĝanta civilizacio
13 La krizo kiel bonŝanco
14 La sterileco de la imagopovo
15 La porekzista malpleno, kiun la konsumismo ne povas plenigi
16 Kulturo kaj politika ekonomio
17 La rekomenciĝo estas proksima
Postparolo de *Helena Norberg-Hodge*

Antaŭ ni malfermas abismo, kiu demandigas ĉion,
kion ni opinias scii pri nia kulturo kaj la naturo.
Nidevas rigardi en nin kaj koncentriĝi pri tio,
kion ni povas ekkoni.
*Paul Klingsnorth*

# LA RIGARDO EN LA ABISMON

**Rupert Read / Samuel Alexander**

**SAMUEL ALEXANDER:**

Rupert, mi volonte ŝatas inviti vin al senrezerve malferma dialogo. Ni ne interparolu kiel sciencistoj, kiuj volas defendi siajn teoriojn, ne kiel politikistoj, kiuj volas gajni balotojn aŭ persekutas politikan agendon, kaj ankaŭ ne kiel aktivuloj, kiuj batals por sia celo, sed kiel homoj, kiuj volas laŭeble plej klare kompreni siajun situacion kaj ekziston en ĉi krizeca historia momento.

La plej multaj sciencistoj, esploristoj, aktivuloj kaj politikistoj hodiaŭ submetas sian laboron kaj siajn pensojn al memcenzuro por defendi opiniojn, kiuj estas sociale, politike kaj ankaŭ por ili mem agrablaj. Ja nature estas kelkfoje fazoj, dum kiuj ni devas esti pragmataj kaj komprenemaj kaj komuniki niajn ideojn facildigesteble kaj adaptitaj je la respektiva publiko. Sed ju pli multe ni faras tion, des pli ni lasas nin deteni de diri tion, kion ni vere pensas; des pli malmulte ni kompetentas, senvuale pripensadi la aktualan staton kaj senkaŝe priskribi tion, kion ni ekkonas ĉirkaŭ ni. Se ni neniam moviĝas en libera malfermteco, povas rezulti, ke ni mem ne plu ekzakte scias, kion ni vere pensas kaj eĉ detenas al ni la veron.

Unu el la plej gravaj principoj de intelekta honesteco estas ne kaŝi sin antaŭ la vero, kiom ajn minaca aŭ malfacila ĝi povus esti. Sed hodiaŭ temas pri veroj, pri kiuj mi supozas, ke multaj homoj ilin ignoras – ne, ĉar ili ne ekkonas aŭ komprenas ilin, sed ĉar ili ne *volas* ekkoni aŭ kompreni ilin. Vero estas, kiel ĉiu filozofo scias, disputata koncepto. Sed eble ĝuste vidalvide de la pliiĝe elvokata postfakta epoko konvenas, denove invoki ĉi nebulecan nocion kaj novdetermini ĝin - ne en la teorio, sed praktike. Mi do invitas vin - sence de praktikata honesteco - al interparolado pri tio, kion ni vere pensas kaj tion laŭeble plej nefiltrita. Tio certcirkonstance postulas iom da sentimeco, ĉar, kiel Nietzsche diras. "se vi longe rigardas en abismon, la abismo ankaŭ rigardas en vin". Ĉu ni kuraĝas tion? Ĉu niaj legantoj kaj legantinoj kuraĝos fari kune kun ni ĉi riskan kaj necertan vojaĝon?

Ni kompreneble ne invitis vin pro hazardo. Vi laŭ mi apartenas al la tre malmultaj pensuloj, kiuj akceptis la proceddon paroli senfiltre. En viaj prelegoj vi parolas pri aferoj, kiujn la plej multaj sciencistoj eĉ ne kuraĝas pensi, ne parolante pri esprimiĝi publike pri tiuj. Mi konas artikolojn de vi, kiuj montras senrezervan honestecon, de kiu mi esperas, ke ĝi inspiras nian interparolon, eble donas flugilojn al ĝi. Unu el tiuj kontribuoj, kies titolo havas nun ankŭ ĉi libro, tekstas: "Ĉi civilizacio fiaskis". Ni komencu per ĉi kuraĝa kaj konsterna aserto, kiu certe bezonas iom da klarigado. Kion vi celas, se vi deklaras ĉi civilizacion fiaskita?

**RUPERT READ:**

Dankon, Sam. Estas privilegio por mi havi dialogon kun *vi* pri ĉi decida demando - pro du kialoj: Unue, ĉar viaj verkoj pri postkreskado kaj libervola konsumrezigno simple estas la plej bonaj, kiuj estas. Sed mi perceptas nian konversacion entute kiel grandiozan lukson, ĉar tiaj interparoloj eble dum unu generacio aŭ eĉ pli frue estos io, kion ni ne plu povas permesi al ni.

Ja vere eblas, ke ni iam, se ni entute ankoraŭ vivos, retroe rigardas nian tempoperiodon eksterordinare privilegita epoko, eĉ se ĝi por multaj homoj (ne parolante pri la bestoj) jam nun multaspekte estas koŝmaro. Ĝuste nun multaj homoj kiel vi kaj mi serĉadas akvon kaj

nutraĵojn kaj devas timi pri sia vivo. Ni pro tio havas la responsecon, fari ion el la privilegioj, kiujn ni rajtas ĝui.

Kion mi ĵus diris multaj homoj verŝajne rigardas sensaciemo. Sed ne estas tia. Estas simple la provo esti malfermita kaj honestas kontraŭ ĉiuj – akcepti vian inviton kaj renkonti vin per senrezerva sincereco. Naturprotektuloj ofte estas akuzataj pri pesimismo. Tio laŭ mi estas tute malĝusta. En realo ĉiuj naturprotektantoj tendencas al troa, nebonigebla optimismo. Oni eble povus riproĉi al mi timigadon aŭ alarmismon. Mi ne estas alarmisto, *mi sonorigas alarmon.* Se faijro disvastiĝas - kiel aktuale, kiam mi skribas tion, okazas en Granda Britio kaj aliaj partoj de la mondo, inklude de la tropikaj arbaroj, kiuj estas niaj planetaj pulmoj - mi faras tion por sonorigi la alarmon. Ĉi centra diferencigo – inter alarmismo kaj pravigita ekalarmigo - estas ekzakte la la diferencigo, kiun faris Winston Churchill en la naŭdektridekaj jaroj, sub simile malfacilaj (eĉ se, ĝustadire, malpli alarmigaj) cirkonstancoj.

La sento de paralizo, kiun kelkaj homoj perceptas, supozeble rilatas al tio, ke ili fiksiĝas inter malĝustaj esperoj: unuflanke la trompemaj tentoj de la optimismo, la espero pri teknika solvo, kiu malakrigas la klimatokrizon kaj zorgas pri tio, ke la vivo plimalpli kontinuadas kiel kutime. Tio laŭ mi detenas nin en vere danĝera maniero okupiĝi pri la realeco de la klimatosituacio. Aliflanke estas la obskuraj timoj, kiujn la plej multaj homoj ne volas artikuli kaj al kiuj ili ne volas konfrontiĝi. Mia mesaĝo estas prefere liberiga ol paraliza: Ni liberigas nin de la komforta posicio de ekologia memkomplezemoo - pri iu la plejmulto de ni en sia interno scias, ke ĝi baziĝas sur iluzioj. Ni kapablas alrigardi niajn timojn. Ni povas ekkoni la aferojn, kiujn aliaj ne volas ekkoni. Kaj fine rilate al niaj agoj ni estas pli liberaj de devigoj.

Unu de la ideoj en la verkaro de Ludwig Wittgenstein, kiu forte influis min, estas, ke vere malfacilaj filozofiaj problemoj ne rilatas al prudenteco aŭ al intelekta metio. Vere malfacile estas prefere esti *volema* ekkoni aŭ kompreni aferojn, kiujn oni ne volas kompreni. Post jaroj de negado kaj de malespera espero mi atingis la punkton, je kiu mi ne plu povas kontesti la fatalon, kiu ĉirkaŭas nin.

En la lastaj jaroj mi venis al la konkludo, ke ĉi civilizacio troviĝas en disfalo. Ĝi ne pludaŭros. Ĝi ne povas, ĉar ĝi ne montras indikojn, ke ĝi perceptas la radikalan klimatokrizon - ne parolante la ampleksan ekologian krizon - kiel tion, kio ĝi estas: kiel ampleksan, tuttergloban krizan staton, kiel porekzistan minacon. Ĉi industri-kreskad-bazita civilizacio ne atingos la Parizajn klimatocelojn; kaj tio signifas, ke ni tre verŝajne kaptiĝos en tervarmiĝo je minimume tri ĝis kvar gradoj laŭ Celsius - kaj tio ne estas kompatibila kun la civilizacio, kiun ni konas.

Ege multe estas en danĝero, ĉar la klimatokrizo endanĝerigas nian civilizacion kiel tuton. Per "ĉi civilizacio" mi celas la hegemonian civilizacion de la tutterglobaligita kapitalismo - kelkfoje nomata ankaŭ "imperio" - , kiu hodiaŭ regas la ege plej grandan parton de la homa vivo sur la Tero. Nur kelkaj indiĝenaj popoloj/komunumoj kaj kelkaj malgrand-kamparulaj kulturoj troviĝas ekstere de ĝi (eĉ se la integrado tagtage pliampleksiĝas kaj pliprofundiĝas.) Ankaŭ ĉi socioj supozebe estos kuntirataj de la Imperio, se ĝi fiaskos, se kolapsas la tutterglobaj ekosistemoj, kiuj estas la vivofundamentoj por ni ĉiuj. Kion mi volas diri per tio estas, ke ĉi civilizacio *certe* transformiĝos. Laŭ mia takso estas tri penseblaj futurscenaroj antaŭ ni:

(1) *Ĉi civilizacio povus kolapsi plene kaj definitive*, rezulte de klimata nestabileco (kiu ekzemple kondukus al katastrofeca manko de nutraĵoj pro la kolapso) aŭ eble pli rapide per atommilito, pandemioj aŭ kolapso de la financsistemo, kiu rezultigus ampleksan disfalon de la civilsocia vivo.
(2) *Ĉi cvivilizacio (ni) iel sukcesas ekestigi futura(j)n post-civilizacio(j)n,* kiam ĝi kolapsas.

(3) *Ĉi civilizacio iel sukcesas transformiĝi prudente, radikale kaj rapide, en neantaŭvidebla maniero kaj ĝustatempe,* por eskapi la kolapson.
La tria scenaro estas la plej multe neverŝajna, eĉ se la plej multe dezirebla, simple ĉar la du aliaj estas ligataj al mizero kaj morto laŭ neantaŭvidebla mezuro. (1) signifas la nuligon aŭ la preskaŭa nuligo de la homaro, (2) estus ligata al multaj milionoj da mortintoj.

Prognozi detale la duan eblon estas tre malfacile, ĝi tamen estas laŭ mia nuna opinio, sufiĉe verŝajna. Unu el la kialoj, pro kio mi volis ĉi interparoladon kun vi, Sam, estas tiu, ke ni povas paroli pri tio, kiel ni preparu nin por ĉi evoluo. Ĝis nun krime malmulte okazis ĉi-rilate. Fakte ĝis nun ĉiu en la pliampleksigita vivmedimovado estis fiksata je la opcio (3) kaj ne volis okupiĝi per io malpli malgranda. Tamen mi fore sentas, ke ĉi starpunkto ne plu estas subtenebla. Je mia ĝojo mi ne estas tute sola ĉi-rilate.

Eble la unua opcio baldaŭ estas tiom verŝajne kiel la dua. Tio restigas malmulton por diskuti.

Ĉiu el ĉi tri secenaroj kunportos tiom da transformado, ke kio sekvos ne plu povas nomata sencdone kiel *ĉi* civilisaciio: La ŝanĝiĝo estos de tia ekstreme nocia kaj porekzista amplekso, kiun Thomas Kuhn, la filozofo de la "paradigmoŝanĝiĝo" nomis "revolucia". Unu- aŭ ali-maniere *ĉi* zivilizacio pro tio finiĝas. Povas esti, ke - pendante je la klifo - ĝi pludaŭros dum certa tempo. Sed post tio ĝi dissolvos aŭ en plenan kaoson aŭ en katastrofon (1); aŭ el ĝia mortanta korpo ĝi estigas ion radikale novan (2); aŭ retiriĝas for de la klifo en sekurecon (3). Por ke *ĉi* miraklo sukcesos, bezonatus tiom da eksterordinara kaj plene senprecedenca ŝanĝiĝo, ke la socio, kiu tiam sin sekurigus, *ne plu proprasence* estus ĉi civilizacio.

Jen mallonge kion mi celas, se mi parolas pri tio, ke ĉi civilizacio finiĝas.